

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : AUGUSTO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

IX^a KONGRESO DE K. E. F.

PROPAGANDAJ GLUMARKOJ

arte desegnitaj, kun belaj alegorioj pri la historia urbo Girona.

Folioj en 10 koloroj
kun 20 malsamaj markoj
Ĉiu folio kostas 0'40 ptojn.

Vin turnu al S-ro F. Hil

Parque Divisionario, n.º 7 - GIRONA

ESPERANTO TRIUMFONTA

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

Ni rekomendas la verkon de

EDMOND PRIVAT

Vivo de Zamenhof

Volumo I

de la

Libraro Bolingbroke-Mudie
eldonata de

BRITA ESPERANTO - ASOCIO

Petu detalojn al K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Fideleco al la Fundamento

QUNTEMPE oni multe legas pri diversaj reformetoj de nia lingvo, kiujn kelkaj samideanoj pretendas enkonduki kvazaŭ ili rajtus ĝeni la ceterajn samideanojn per konstanta proponado de ŝanĝoj kiuj tute ne estas plibonigo.

Estus tre bone se ĉiuj samideanoj ellernus nian lingvon, anstataŭ ol proponi eĉ la plej malgrandan reformon, kaj se ĉiuj relegus atente la Fundamentan Krestomation, kiu tute ne enhavas kvarcent malkorektaĵojn malgraŭ la diro de samideano kuraginta aserti tion sur esperanta gazeto.

Oni konsideru ke la ĉefa kondiĉo por nia venko estas plena, absoluta fideleco al la Fundamento de D-ro Zamenhof. Oni ne enkonduku novajn vortojn aŭ esprimmanierojn senutile kaj senbezone. Kaj oni ne forgesu ke la rajto krei vorton estas tute escepta kaj ke tiu ĉi sola ĝin havas, kiu funde scipovas kaj posedas la lingvon.

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.

SENINTERROMPE laboras la Organiza Komitato de nia Kongreso por ĝia soleno kaj brilo. Ni povas antaŭdiri ke ĝi estos grava sukceso el ĉiuj vidpunktoj, ĉefe el tiu de la oficiala apogo kaj partopreno, kiel oni konstatos legante la eminentajn nomojn de ĝia

HONORA KOMITATO

Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII, *Prezidanto*.

Lia Ekscelenca Moŝto la Ministro de Publika Instruado.

» » » Sinjoro J. Puig i Cadafalch, prezidanto de «Mancomunitat de Catalunya».

Lia Ekscelenca Moŝto la Civila Provincestro de Girona.

» » » Sinjoro Valentí Carulla, Rektoro de la Barcelona Universitato.

Lia Moŝto la Prezidanto de la Provinca Deputitaro de Girona.

Lia Moŝto Sinjoro Markizo de Camps, senatano.

» » » Francisc d'A. Bartrina, senatano.

» » » Carles Cusi, senatano.

» » » Narcís Pla i Deniel, parlamenta deputito.

» » » Salvador Albert, parlamenta deputito.

Sinjoro Urbestro prezidanto de la Konstitucia Urbkonsilantaro de Girona.

Sinjora Moŝto Direktoro de la Ĝenerala Teknika Instituto de Girona.

Sinjoro Generalo, Militista ĉefo de Girona.

Reverenda Sinjoro Vicari Capitalar de Girona.

» » Rektoro de la Seminario de Girona.

Sinjoro Direktoro de la Normala Lernejo por Instruistoj, de Girona.

Sinjorino Direktorino de la Normala Lernejo por Instruistinoj, de Girona.

Sinjinorino Direktorino de «Escola Graduada».

Sinjoro Direktoro de «Grup Escolar».

La loĝantaro de la kongresurbo interesiĝas al nia movado kaj la urbaj ĵurnaloj tre ofte raportas pri ĝi, precipe «El Autonomista».

Oni povas certigi ke la literatura festo de la Floraj Ludoj oka-

zos en la bela «Teatre Principal» kaj ke la Urbestro havigos ankaŭ grandan salonon por instali la Esperantan Ekspozicion.

Ni petas denove la samideanojn bonvolu sendi por ĝi ĉiuspecajn esperantaĵojn al S-ro Francisco Hil, Parque Divisionario, n-ro 7, Girona.



VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

LISTO DE RICEVITAJ VERKOJ

1.—Secundum Scripturas. 2.—Estontulo. 3.—Ruskinano. 4.—Al senmorta Gerona (*subskribita!*). 5.—Al senmorta Gerona (*subskribita!*). 6.—Konstanteco. 7.—Eduko kaj Kulturo. 8.—La falsa aŭ vera puritanismo de la nuna esperanta literaturo malhelpas ĝian beletristikan disvolviĝon. 9.—Ni amu la pacon de l' Naturo. 10.—Magnificat. 11.—La unua fojo. 12.—Les reines vestien tûniques blanques .. 13.—Sub la verda stelo, ni antaŭen iru. 14.—Nubo mistera. 15.—Gloron al nia Majstro. 16.—En Kristo por la fratoj. 17.—Por Dio kaj eklezio. 18.—Individuo. 19.—Tradicio. 20.—Hortus conclusus pura fons es... 21.—Sunt qui cuvrículo suo... 22.—Homeco : Heroeco :: Infaneco : Viktimeco. 23.—Festina lente. 24.—Festina lente. 25.—Sinite parvulos venire ad me. 26.—La Aeroplano. 27.—Ut omnes unum. 28.—Veni sancte Spiritus. 29.—Karulin' atendu min. 30.—Progreso. 31.—Momo. 32.—Pretigu vian valizon. 33.—Ama elreviĝo. 34.—En sonĝo festenon mi vidis...

Ni rememorigas ke la 15^a de Aŭgusto estas la datolimo por akcepto de verkoj.

Karakteroj

PAROLULOJ KAJ PENSULOJ



STAS parolartistoj, kiel estas pensartistoj: la oratoroj kaj la pensistoj.

La oratoroj pensas obee al la parolo. La pensistoj parolas obee al la penso.

Ĉe la esprimitaj pensoj la oratoroj facile kaj ŝate kaj plaĉe lernas la parolojn, la esprimojn, dum la pensistoj avide kaptas profunde la pensojn.

La dirbelego, la esprimfacileco, la parolriĉeco brilas, floras de la oratoroj je malgranda ia penso, kaj eĉ emociigas tiuj artistoj konstatante la mirindaĵon ke la parolado igas ilin pensi kaj diri pensojn pli profundajn ol ilia penskapablo povus, antaŭparole. Tamen la pensuloj suferas ke la paroloj malfacile esprimas la profundon de iliaj pensoj, kaj penas diri per paroloj plej ĝuste kaj sincere la pensojn.

Afabla leganto, kiu honoras min per via atento; se vi legis nur la vortojn, bonvolu legi nun la pensojn, ĉar mi ne pensis por aŭ pro la vortoj, sed mi verkis por kaj pro la pensoj, kaj pardonu la postulemon de

DELFI DALMAU



La kataluna ŝlosilo

La fakto ke dum malpli ol tri monatoj estis vendataj 600 ekzempleroj de la Poŝvortareto Kataluna-Esperanta, elmontris la tujan neceson reeldoni la katalunajn propagandilojn.

Konforme al tio, ĵus estas farita de K. E. F. nova eldono de la malgranda kataluna ŝlosilo, kun propaganda teksto sur la kovriloj pri la nunaj sukcesoj de Esperanto, kaj baldaŭ oni entreprenos la eldonon de aliaj samcelaj verketoj. Helpu per aĉeto de ekzempleroj!

Ĉiutage

Sunradioj sur kampojn falas plene.

Restas ĉiel' serene,

je nub', je ĉio sene.

Jen, ŝvitante—:

kampan'—laboradante;

bovoparo—plugadante.

En flu' versig'as la ŝvit'

de la kapo de l' plugist',

kaj la tero ŝvitgutojn glute prenas

kaj viron danke benas.

Merite ja li penas:

li ŝvitante

iras, teron^o plugante.

Kampana verd' kaj bluo de ĉiel'

longdaŭre kisas sin,

longdaŭre kiel lumohel'.

La griloj kvazaŭ preĝas sen difin'.

Alvenas jam malhel',

kiun dispelos sun'.

Kampoj: ĝis morgaŭ, nun!

EMILI GUANYABENS

El kataluna lingvo tradukis

JOSEP GRAU CASAS

Laŭdo al la Parolo



A parolo estas tio plej ravanta en la mondo, ĉar en ĝi sin alpremas kaj kunfandiĝas la tuta ĉarmo korpa kaj la tuta spirita ĉarmo de nia naturo.

Ŝajnas ke la tero uzas siajn tutajn fortojn por produkti la homon, kaj ke la homo uzas la tutan forton de sia estaĵo por produktadi la parolon. Vi vidas homon ankoraŭ silentan, kaj vi lin trovas simila al animala estaĵo pli-malpli perfekta ol la aliaj; sed, iom post iom, vivo ekmontriĝas sur lia vizaĝo, ekesprimo plenigas liajn okulojn de spirita lumo, liaj lipoj moviĝas, vibras la aero kun subtila varieco, kaj ĉi tiu materia vibrado, ricevita de la sento, kunportas en sia interno tiun nematerian aĵon vekantan la spiriton: la ideo.

¡Kiel! Ĉu vi aŭdas la brueton de la vento, la bruon de l' akvo kaj la bruegon de la tondro lasantaj en via spirito tre neprecizan senton, kaj sufiĉos ke malgranda infano, kiu nur sin aŭdiĝas de tre proksime, diru dolĉe «Patrino» por ke—ho, mirindaĵo!—la tuta spirita mondo vibru intensege en la fundo de via koro?

Subtila moviĝo de la aero sciigas al vi la grandan variecon de la mondo, kaj starigas en vi la fortan antaŭsenton de tio nekonata kaj senfina.

¡Ho! ¡Kiel sanktega afero! Diras Sankta Johano: «Je la komenco estis la parolo, kaj la parolo estis en Dio, kaj la parolo estis Dio!»; kaj oni diris ke per ĝi ĉiaj aĵoj estis farataj; kaj ke la parolo iĝis karno kaj loĝadis en ni. ¡Kia abismo de lumo!

Kun kia sankta timo, do, ni devas paroli! Se estas en la parolo la tuta mistero kaj la tuta lumo de la mondo, ni devus paroli ĉiam ravitaj, kvazaŭ blindigitaj; ĉar ne estas vorto—kvankam al ni ĝi prezentu malgrandan signifon—ne devenanta el inspira lumo kaj ne reflektanta ion el la lumo senfina kiu naskis la mondon. Kiel ni povas paroli malvarme kaj tiom abunde? Pro tio ni aŭdas nin, unuj la aliajn, plej ofte, tiel indiferece; tial ke la kutimo troe paroladi kaj troe senti malhelpas al ni konscii la sanktecon de la parolo.

Ni devus paroli malpli multe, kaj nur pro forta deziro je esprimado; kiam la spirito ektemas maturplena kaj fluas la vortoj kiel la floroj burĝonas en Printempo, unu post unu kaj ne en ĉiuj branĉoj, sed en unu bonsorta branĉo; kiam unu branĉo ne plu povas elteni sian internan printempon, tiam meze de la abundaj folioj burĝonas la floro kiel ravanta esprimo. Ĉu vi ne vidas en la kvieto de la kreskaĵoj ilian admiron esti ekflorintaj? Tiele ni, kiam fluas el niaj lipoj la vera parolo.

Tiel parolas la poetoj. Ĉion ili rigardas ravite, poste ili febrigaĵas, fermas la okulojn kaj parolas en la febro; tiam, similaj al Dio en la unua tago de la Genezo, ili diras iun kreantan vorton, kaj el la haoso eliĝas la lumo.

Kaj tiel la parolo de la poeto eliĝas kun ritmo de lumo kaj ritmo de so-

no samtempe, tio estas, kun la ritmo unika de la beleco kreipova: tia estas la dia ĉarmo de la verso.

Sed, forgesemaj ofte je la dieco de la mondo, ni malŝatas la malgrandan aŭ grandan poeton ekzistantan en ĉiu el ni, kaj ni parolas longege sen inspiro, sen ritmo, sen lumo, sen muziko, kaj niaj vortoj elfluas sensignifaj kaj lacigaj, kvazaŭ kreskaĵo disperdiĝanta je sennombraj folioj, nescianta la mirindecon de la floroj kiujn ĝi kunportas en si, neesprimitaj.

Ni lernu paroladi de la popolo. Ni lernu de la paŝtistoj kaj de la apudmaraj loĝantoj. ¡Kiom rigardadas unuj kaj aliaj, en silento, la majestecon de la mondo, tie kie la spirito korbatas kun granda ritmo! ¡Kiom da senmezura grandeco estas reflektintaj iliaj okuloj; kiom da beleco de ĉieloj blujaj, de herbejoj verdaj kaj de maroj ofte kolorŝanĝantaj kiel virgulina vizaĝo, de ruĝaĵoj aŭroraj aŭ sunsubiraj, de nebuloj grizaj kaj pluvoj malklaraj! ¡Kiom da vento aŭdis iliaj oreloj, kiom da ritmaj ondaroj, kaj la fondroj kiuj alproksimiĝas kaj reforiĝas, kaj la muĝado de la bovoj kaj krioj misteraj tra la spaco! ¡Kiom da odoro je saloza akvo kaj herbo freŝa; kaj kiom iliaj sentoj estas ame tuŝitaj de ĉio pura! Iliaj mienoj aspektas kvazaŭ ravitaj de tio kaj vere parolas; sed, kiam ili parolas, iliaj vortoj estas tute sencoplenaj. Ĉu vi ne rimarkis la kant-paroladon de la montaranoj aŭ de la maristoj? Ilia parolo estas muzika, ĉar ĝi naskiĝas pli proksime de la ritma korbato de la kreitaĵo.

Mi memoras tagon ĉe la grandaj altaĵoj Pirenaj, en plena tagmezo, dum kiu ni antaŭeniris perdiĝinte tra tiuj altaj solecoj. Sur la nuda ŝtono ondarsimila ni estis erarintaj ĉian vojon, kaj vane ni demandis per malkvieta okulo la mutan grandegecon de la montaraj senmovaj. Nur la vento tie laŭtis per nefiniĝebla krio. Subite, en la krio de la vento, ni aŭdis nevideblan tintilaron; kaj niaj timiĝitaj okuloj, ne kutimiĝintaj al tiaj grandeco, tre malbaldaŭ ekvidis ĉevalinaron kiu en krutaĵo de malabunda verdeco sin paŝtis. Esperoplenaj, ni aliris tien ĝis ni renkontis la paŝtiston kuŝantan apud la fumanta marmito, kiun la knabo paŝtist-helpanto, genuoj surtere, kun atento zorgadis. Ni demandis pri vojo, kaj la viro, kiu ŝajnis el ŝtono, turnis la okulojn en sia kvieta vizaĝo, levis malrapide la brakon montrante nedifinitan vojon, kaj movis la lipojn. En la tondranta bruo de la vento, kiu ĉian voĉon englutis, flosadis nur du vortoj kiujn la paŝtisto ripetadis kun insisto: «Tiu kanalo...» kaj montradis tien, neprecize, en la supron de la montoj. «¡Tiu kanalo!...» ¡Kiel belaj estis la du vortoj, en la vento majeste dirataj; kiom plenaj de senco, de poezio! La kanalo estis la savanta vojo, la akvofluojo tra kiu defluas la akvoj de la degelintaj neĝoj... Kaj ĝi estis, ne iu ajn, sed «tiu» kanalo, tiu kiun li perfekte distingis el la aliaj; ĝi estis io, ĝi havis animon, ĝi estis *tiu kanalo*... Ĉu vi rimarkas? Por mi, tio estas paroli...

Mi memoras nokton trans la Pireneo, kiam eliris el la mallumo infanino kantanta per feina voĉo. Mi petis ŝin ke ŝi diru al mi ian vorton en sia propra lingvo, kaj ŝi, tute mirigita, montris la stelbrilantan ĉielon, kaj parolis nur tiel: «La steloj». Kaj ŝajnis al mi ankaŭ ke tio estas paroli.

Mi memoras vesperon sur pinto de la Kantabra marbordo, kie la sunsubiroj estas belaj. Oni iradis tien rigardi la sunon subigantan en la maron; ĉiuj venis parolante; sed, alveninte tien, ĉiu silentadis antaŭ la maro varianta je koloroj. Alvenis du maristoj, ili sin metis antaŭ la senfina marbordo kaj dum longa tempo, unu apud la alia, silentis. Poste, unu el ili, ne moviĝante nek sin turnante al la kunulo, diris al li: «Rigardu». Kaj ĉiuj aŭdintaj tion rigardis antaŭen, vidante ĉiu mirindaĵon propran. Ankaŭ, tio estas paroli: kaj ĉio alia, malplenaj vortoj.

«Tiu kanalo»... «La steloj»... «Rigardu»... Vortoj kiuj kunportas kanton en si, ĉar ili naskiĝas en la ritma korbato de la Universo... Nur la naiva popolo povas ilin eldiri, kaj la poetoj rediri kun naiveco pli intensa kaj pli laŭta kanto: kun lumo pli hele malkovra. Ĉar la poeto estas la homo plej naiva kaj plej scianta el la tero.

Kaj, kiam la poetoj scios, ĝin ellerninte, sian lingvon superbela, kaj forgesigos al ni ĉiun alian post ol tiu ĉi estos jam forgesita de ili, tiam alvenos ilia regno, kaj ni ĉiuj parolos tiel, ravitaj de la muziko kiu kreas. Ni ĉiuj parolos preskaŭ kantante, per voĉo elirinta el la interno de ĉiu mem, malŝatante la artifikon de la interkonsentitaj lingvoj, kaj ĉiu nur estos komprenata de tiuj kun kiuj li bezonos interkompreniĝi; sed, kiam li parolos, el la fundo de l'animo, kun amo, li komprenigos sin de ĉiuj kiuj kun rava amo lin aŭskultos; ĉar en amo okazas tio, ke duonkompreni vorton estas pli bona kompreno ol kompreni ĝin tute: kaj tiu ĉi estas la sola universala lingvo.

Ne estas la ekstera harmonio la plej dezirinda, sed la interna; ĉar ne estas pro la bruo de la vortoj kial ni ĉiuj homoj estas fratoj, sed pro la spirito unika kiu ilin naskas diversaj en la mistera varieco de la mondo. Kaj tiun spiriton ni devas serĉi tra tiu varieco mistera, rigardante la parolon kiel sanktegan neprofaneblan aĵon, kaj parolante ĉiu, kun sankta timo, la lingvon de la popolo en kiu Dio naskis lin, al li donante per ĝi lian kreantan parolon.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis
JAUME GRAU CASAS



Ekzamenoj por Profesoroj



EN la Barcelonaj esperantistoj havas antaŭ si okazon okupiĝi pri la pliriĝo de sia scio de Esperanto kaj samtempe ĉiuj samideanoj en Katalunujo la eblecon atingi la titolon de Profesoro.

Ni ne bezonas pritrakti longe la aferon por konstati kiom necesaj estas la ekzamenoj kaj precipe specialaj kursoj por ebligi al ĉiuj la ellernadon de la lingvo, kiun bedaŭrinde nur tre malgranda nombro da personoj konas profunde. Kial? Ĉu la lingvo per si mem estas tiel malfacila kaj prezentas tian netransireblan balaston, ke multaj, multaj kunbatalantoj restas nur en supraĵa kono kaj por ili Esperanto estas peza kaj malfacile uzebla? Ne: la tuta konstruaĵo de nia internacia lingvo estas farita el tiel pura kaj travidebla materialo, ke oni nur devas *voli* por ĝin tute detale kompreni; ĉiuj ĝiaj ŝtonoj sidas sur sia difinita loko kaj unu sola rigardo estas sufiĉa por ĝuste uzi la meĥanikismon de la belega komponilo.

Kial do oni tiel ofte ricevas kaj vidas skribaĵojn, kies sencon oni nur tre malfacile povas deĉifri kaj kiuj minacas korupti la stilon de kontinueco kaj internacia komprenebleco? Pro tio ke unuflanke la gvidantoj ne multe atentas pri la instruado de la lingvo kaj ĝenerale lasas la novajn varbitojn en elementa kono kaj fidas al tio, ke per si mem ili perfektigos iom post iom. Ĝuste tio ĉi naskas malbonajn alkutimiĝojn, kiuj poste degeneras ĝis tute netolerebla frazkonstruo, malbonsoneco en elparolado, k. t. p., k. t. p.

Aliflanke ni vidas kiom da gazetoj konstante entrudas superflujajn neologismojn, kiuj malbeligas nian Esperanton ĝis tia grado, ke baldaŭ oni ne plu rekonas la iaman gracian belecon, kiu faris la lingvon ĉarma, malpeza kaj facile komprenebla. Al ĉio tio ĉi oni aldonu la lingvan polemikadon regantan ĉie kaj kun bedaŭro ni konstato kiom da tempo senbezone foruziĝas en laboroj tute malpraktikaj, celantaj neniun profiton: kontraŭe, per tio ni nur sukcesos krei malordon kaj personan atakemon inter spertuloj, kies senpripensa individua agado dolore frapos la movadon.

Ni ŝanĝu la ĝisnunan sistemon de instruado. Ni bone taksu la valoron, kiun havas didaktiko por plej rapida lernigado kaj ni atingos efikan rezulton. Ni instigu la komencantojn daŭrigi la studojn ĝis la fino kaj tiam ĉirkaŭ ni multobligos la amantoj de la Zamenhofa verko, kiun des pli oni ŝatas, ju pli oni ĝin lernas.

La gvidantoj de kursoj estas la unuaj, la ĉefaj subtenantoj de la afero. Pro tio la tuta klopodado de grupoj precipe devas esti dediĉata al konstante kontrolata funkciado de siaj kursoj, per kiuj ellaboriĝas la estontaj samideanoj.

Pro la elmetitaj kaŭzoj kaj pro tiuj aluditaj en la Oficiala Parto de la lasta numero, ŝajnas al ni necesa la organizado de profesorado, kiu, plene konvinkita pri sia alta celo, zorgos pri la fundamenta instruado kaj klopod-

dos, ke la lernantoj penetru la lingvon ĝis ĝia spirito kaj koro, tiamaniere ke ili fariĝu perfektaj premantoj de la lingva klavaro, kies sonoj estas tiel harmoniaj, tiel ravaj... se oni ne deflankiĝas de la unu fojon por ĉiam akceptita fundamento.

La unuan ŝtupon de la priinstrua reorganizo ni firme starigis kaj esprime ĉiuj atentis pri ĝia graveco kaj ĉeestis la publikajn paroladojn de profesoroj A. Domènech, D. Dalmau kaj Josep Grau, kiuj honoris nin akceptante la gvidon de la antaŭekzamena kurso, kiun povas ĉeesti absolute ĉiuj fervoruloj.

La klarigadoj okazos en nia sidejo (Ateneu Enciclopèdic Popular, Carme, 30, pral.) la 10-12-17-19-22-24-26-29 kaj 31.^{an} de l' kuranta monato je la 10.^a nokte.

La ekzamenoj, kies juĝantaro konsistis el Sroj. Frederic Pujulà, J. Bremon Masgrau kaj la nomitaj profesoroj, okazos ankaŭ en nia sidejo la 4.^{an} de Septembro je la 10.^a matene.

Ke ĉiuj per sia entuziasmo helpu al la sukceso de nia entrepreno, kies esperinda sukcesa rezultato grave helpos la pluan disvastigadon de Esperanto en Katalunujo.

Ni fosu nian sulkon, sed ni faru tion laŭ plano!

S. ALBERICH JOFRÈ, SEKRETARIO DE K. E. F.

Antoni Grabowski

La tutmonda esperantistaro funebras pro la perdo de la fama poeto kaj malnova samideano Antoni Grabowski, mortinta la 4.^{an} de Julio 1921.

Grabowski naskiĝis la 11.^{an} de Junio 1857 ĉe Chelmino apud Vistulo, vizitis la gimnazion de Torun (Thorn), studis ĉe Universitato Breslau filozofion, lingvojn, natursciencojn kaj ĥemian teknologion.

Li estis direktoro en la Lingva Akademio (Gramatiko), aŭtoro de multaj esperantaj verkoj kaj Honora Prezidanto de Pola Esperanta Societo.

El liaj verkoj distingiĝas la traduko de pola epopeo «Sinjoro Tadeo» kaj la antologio «El Parnaso de l' Popoloj» en kiu troviĝas bonege tradukita Kanto el nia kataluna poemo «La Atlàntida» de Verdaguer.

Al lia familio kaj al la pola esperantistaro ni prezentas nian sinceran kondolencan.

Oficiala Parto



OM post iom proksimiĝas la tago de nia kunveno en Girona kaj pro tio ŝajnas al ni oportune rememorigi niajn laboremajn amikojn, ke por la plej bona organizo de la laborkunsidoj, kiujn tre kredeble oni devos iom limigi pro manko de tempo, estas tre konsilinde sendi al ni kiel eble plej baldaŭ ĉiun temon pritraktotan por ebligi la preponon de la tagordo, kiu, kompreneble, estas diskutota kun prefero.

Ĉiuj ekŝajnoj kaj supozoj kredigas, ke la laborkunsidoj estos superŝutitaj per diversaj gravaj aferoj koncernantaj nian organizadon kaj nian propagadon.

Jen unu el ili ĵus ricevita kaj pri kiu ni rekomendas al ĉiuj federacianoj atentan studon. Ĝi koncernas nian regularon, kiun Esp. Soc. «Paco kaj Amo» proponas ŝanĝi per la jena:

KATALUNUJA ESPERANTISTA FEDERACIO (K. E. F.) FEDERACIÓ ESPERANTISTA DE CATALUNYA

ARTICLE PRIMER.—Pels presents Estatuts i amb el nom esmentat queda reorganizada col·lectivament l'organització individual que amb el nom de Kataluna Esperantista Federacio (Federació Catalana d'Esperantistes) hi ha constituïda a la nostra regió.

Aquesta Federació passa a ésser formada per societats, grups i seccions esperantistes existents a Catalunya.

ART. 2.^{on}—L'objecte exclusiu de la K. E. F. és l'unió de tots els esperantistes associats residents a Catalunya, per a la propaganda i divulgació de l'Esperanto i per a donar compliment a tots els acords i consells que afectin als esperantistes en general, provinents dels Congressos Universals o dels nuclis directores de l'idioma del Dr. L. L. Zamenhof.

ART. 3.^{er}—La K. E. F. serà regida per un Comitè Directiu, renovable per meitat cada any, compost de president, vice-president, secretari, vice-secretari, comptador, caixer, vice-caixer, bibliotecari, primer vocal, segon vocal i tercer vocal.

Integrarà aquest Comitè un o més socis de diferent centre, agrupació, etcétera, federats, com a propis representants o delegats.

Peroxò els càrrecs indicats al primer paràgraf s'entenen desempenyats pels organismes a que pertanyen els delegats que per a la formació d'aquell Comitè indiqui cada un d'ells i per conseqüent cap individu representant podrà fer en justícia ostentació del càrrec que en nom del organisme desempenyi.

Essent els organismes esperantistes els propietaris dels càrrecs del Comitè Directiu, podran sempre que ells ho creguin convenient, ja siga per raons de criteri, incompliment o incapacitat, canviar llurs delegats que formin part del mateix.

ART. 4.^{rt} — Els diversos organismes pertanyents a la K. E. F. contribuiran al sosteniment de la mateixa amb la quota trimestral pagada per endavant de ptes. minim per cada un dels socis que'ls integrin.

ART. 5.^e — Pel millor compliment de l'article segon la K. E. F. publicarà una revista, orgue d'informació i propaganda esperantista, redactada en les llengües Esperanto, català i castellà indistintament, la organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior, publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu, qui a la vegada serà censor de la mateixa.

ART. 6.^e — La revista serà repartida gratis a les organitzacions federades i, mitjançant el pagament per endavant de la meitat del abonament que per a la revista més avall s'estableix, a llurs membres.

Els membres d'entitats federades que desitgin abonar-se a la revista ho faran per mitjà de llurs entitats.

Tota entitat, grup, secció o individu no federats podran també rebre la revista satisfent en la mateixa forma expressada en el primer paràgraf l'abonament de ptes. Aquests es dirigiran directament al Comitè de la K. E. F.

ART. 7.^e — Els vice-presidents d'aquelles organitzacions esperantistes federades i domiciliades a fora del punt de residència de la Direcció de la K. E. F. constituïran Consells Consultius de la mateixa, que es formaran un apart en cada localitat o entre dues o més, segons l'importància de les poblacions on radiquin i del nombre d'organitzacions en elles establertes.

ART. 8.^e — A cada un dels Consells Consultius podrà dirigir-se el President o Secretari de la Federació per a conèixer la seva opinió en els casos en que ho creguin convenient. Per mitjà d'un individu component que designaran pels treballs de secretaria, aquells informaran al Comitè sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en ço que fóra de desitjar per a la millor marxa de la Federació i del moviment esperantista, particularment dintre de les respectives localitats.

ART. 9.^e — El Comitè de la K. E. F. cridarà una vegada l'any, en diferent lloc, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats en assemblea general, en la qual, prèvia ordre del dia, es donarà compte als assistents del estat econòmic de la Federació i dels treballs i gestions fetes pel referit Comitè durant son exercici; es discutiran les proposicions que per llur importància hagin sigut presentades temps abans de la data de la celebració de l'assemblea per a ésser incloses a l'ordre del dia i exposades a la revista, com també les de caràcter general i menys interès que es presentin momentàniament; es nomenarà les organitzacions que hagin de formar la meitat del Comitè a renovar pel següent exercici, i s'acordarà el lloc on hagi de celebrar-se l'assemblea vinent. Pels debats dels assumptes pertanyents

a les assemblees, es nomenarà la mesa de discussió en el moment de la constitució de les mateixes.

ART. 10.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu a les sessions de les assemblees anyals, però sols podran votar les delegacions enviades expressament per cada una d'elles com a representants directes.

Les votacions seran corporatives, de manera que cada delegat tindrà tants vots com agrupaments de cinc socis formin la col·lectivitat organitzada i representada, o siga un vot per cada cinc socis. Les fraccions que puguin resultar s'englobaran entre totes les d'un mateix criteri i formaran un vot per cada enter que resulti. Pel millor compliment de la condició anterior totes les col·lectivitats enviaran an el Comitè un certificat trimestral de llur moviment. Tals col·lectivitats procuraran revestir llurs delegacions, compostes d'un o dos delegats, d'amplia confiança per tal de fer efectius els acords que recaiguin.

ART. 11.—El Comitè estarà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la K. E. F. i de l'Esperanto, quines comissions seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

ART. 12.—Sempre que el Comitè Directiu cregui que per l'importància i nombre de temes a discutir, o les circumstàncies que atravesi el moviment esperantista a Catalunya, hi ha ocasió de fer-ho, convocarà totes aquelles col·lectivitats que componen la Federació o els esperantistes en general, aquests siguen o no federats, a un Congrés on es resoldran els temes o assumptes que els motivin.

ART. 13.—La llengua oficial de la Federació serà l'Esperanto, podent ésser també usada a les assemblees i congressos la catalana i la castellana en cas necessari.

ART. 14.—Les esmenes que es vulguin fer en aquest reglament hauran d'ésser presentades amb temps convenient per a ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades a les assemblees generals.

ART. 15.—Aquesta Federació podrà actuar mentres compti amb quatre col·lectivitats organitzades i convenientment federades.

En cas de dissolució, previ acord de la mateixa, l'actiu que existeixi serà repartit entre les col·lectivitats federades.

ARTICLE TRANSITORI.—La K. E. F. estarà domiciliada a Barcelona, carrer del Carme, 30, pral.—ESPERANTA SOCIETO «PACO KAJ AMO»

Speciale ni atentigas pri tiu ĉi temo la Konsultan Komitato, kiu jam de nun povus interŝanĝi vidpunktojn kaj se eble iri al la kongresurbo kun pli-malpli difinitaj celoj.

S. ALBERICH JOFRÈ, SEKRETARIO

La opinio

Ho ve, mia kara Karonjo!

Neniam forgesos vin mi!

La mondo jen diris vidante

Pasantan la ĉerkon kun ŝi.

La pastro. — Komencu la kanton.

Doktoro. — Jam ĉesis dolor'!

La patro. — Sufokas min ploro!

Patrin'. — Morti volas la kor'..!

Knabeto. — Tre zorgornamita!

Junulo. — Belega post mort'!

Fraulino. — Ho ve, malfeliĉal!

Maljuna virin'. — Bela sort'!

Bonuloj. — En paco ripozu!

Aliaj. — Adiaŭ al vi!

Saĝulo. — Jen unu malpliel!

Poeto. — Anĝel' unu plil!

R. DE CAMPOAMOR

El hispana lingvo tradukis

VICENTE INGLADA

Nova Grupo en Armentera



EZE de la Empordana regiono, konata kiel unu el la plej belaj el Katalunujo, en la simpatia vilaĝo Armentera, ĵus estas fondita nova Grupo de entuziasmaj junuloj, ĉiuj lertaj kaj laboremaj esperantistoj.

Por solenigi la starigon de la nova Grupo «Empordana Ebonaĵo», ĝiaj anoj aranĝis propagandan paroladon por la 25.^a de Julio, tago de Sankta Jako, kiun la vilaĝo kutime festas ĉiujare kun eksterordinara brilo, kaj ĝi okazis tre sukcese ĉe «Teatre Catalunya», ĉeestata de popolamaso el la tuta regiono.

Je la 11.^a matene, okupis prezidan lokon sur la scenejo la Urbestro kaj la Paroĥestro, akompanataj de distingindaj samideanoj inter kiuj troviĝis la aŭstraj infanoj Heinrich Günter kaj Robert Scheurer.

Pastro Josep Casanovas alparolis al la ĉeestantoj pri la fondiĝo de la Grupo, citante la gastigon de aŭstraj infanoj kiel pruvon de la bono kaj komprenebleco de Esperanto, kaj prezentis la parolanton, S-ron Jaume Grau, Redaktoron de «*Kataluna Esperantisto*».

Dum tri horkvaronoj S-ro Grau disvolvis sian paroladon, klarigante la celon, neceson kaj perfektecon de Esperanto, ĝian praktikan aplikon, edukan valoron kaj nunan disvolviĝon, kaj aludis la baldaŭan realigon de la XIII.^a Kongreso en Praha, pri kiu antaŭvidiĝas grava sukceso. Li finis per kelkaj esperantaj vortoj de kuraĝigo al la Grupanoj.

Per forta aplaŭdado la publiko montris sian aprobon al la esprimitaj ideoj kaj finé oni kantis nian himnon, ĉirkaŭ la verda standardo.

Multaj reale interesiĝis al nia afero, inter ili, S-ro Pere Armengol, Supera Instruisto el Figueres; ĉeestis kelkaj esperantistoj el la malnova Grupo «Norda Stelo» de La Escala, kiuj promesis revigliĝi; ĉiuj sin montris pretaj ĉeesti la katalunan Kongreson en Girona; resume, la festo atingis veran sukceson, kion oni precipe ŝuldas al samideanoj Pastro Casanovas kaj Josep Armengol.

Bibliografio

DOKUMENTOJ DE ESPERANTO.—Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanta movado, kunmetita de Dro A. Möbusz, Lübeck. Eldonis Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin.—Jen grava libro kiu venas pleniĝi la malplenon ĝis nun ekzistintan en la esperanta libraro.

Ja multaj propagandistoj kaj instruantoj de nia lingvo povis multfoje sperti tiun malplenon kiam por propagandaj celoj necesis informiĝi pri iu fakto aŭ demando rilatanta la historion aŭ la organizon de esperantismo. Tiam ili devis traserĉi la deziratan sciotaĵon tra la paĝoj de malnovaj gazetoj ne ĉiam facile akireblaj, kun perdo de tempo kaj granda ĝeniĝo. Prahistorio de la lingvo internacia, biografio de D-ro Zamenhof, deveno de Esperanto, Universalaj kongresoj kun ĉiuj kongresparoloj de la Majstro, oficialaj institucioj, kaj multaj aliaj konindaĵoj pri organizado, institucioj, k. t. p. konsistigas la riĉan enhavon de la libro, kiun mi varme rekomendas al ĉiuj entuziasmuloj, propagandistoj kaj instruantoj.

PERLOJ EL LA ORIENTO.—Tradukoj el japanaj kaj ĥinaj klasikaj verkoj, de K. Ossaka. Eldonis *Nippon Esperanto-Sya*, Tokio.—La orientaj literaturajoj, tiel malmulte diskonigitaj inter la eŭropanoj (ja ili, pro profunda lingva diferenco, malofte estas tradukitaj en eŭropajn lingvojn, tial ke la tradukoj neeble konservas la originalan ĉarmon) danke al Esperanto komencas esti konataj en Okcidento. En tiu ĉi libro, la leganto povas ĝui la tutan ĉarmon de kelkaj ĥinaj kaj japanaj poemoj, en kiuj ludas la rolojn dioj kaj diinoj, spiritoj, herooj, drakoj kaj mitbestoj.

Eble pro laŭvorta fideleco al la originaloj, la versaĵoj strange sonas, ritmo tute malestas kaj, pli bedaŭrinde ankoraŭ, kelkaj preseraroj estas dissemigitaj tra la diversaj paĝoj. Krom tio, la stilo estas tute ne rekomendinda.

KANTARETO.—Kolekto de esperantaj kantoj kunmetita de Vale kaj eldonita de Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin 1921.—Ĉar en ĝi oni legas krom kelkaj majstraj kantpoeziaĵoj jam de longe konataj de la esperantistaro (*La Espero* de la Majstro, *La Tagigo* de A. Grabowski) aliajn bonajn tradukaĵojn de Germanaj kantoj oni devas bedaŭri ke la kunmetinto de tiu broŝureto estu ĝin farinta tiel eta kaj malmulte enhava.

LA STRUVELPETRO.—J. D. Applebaum tradukis esperanten la ĉie konatan verkon de D-ro Heinrich Hoffman, kaj zorgeme ĝin prezentas *Literatura Instituto Rütten & Loening*, Frankfurt a. M.—Arte ilustrita, kartone bindita, tiu eldono prezentas ne nur al la infanoj, sed ankaŭ al plenaĝuloj, ŝatindan donacon, per kiu gepatroj kaj amikoj povas regali siajn karulojn.

FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI.—Historia novelo de Julio Mangada Rosenörn, Madrid.—La laborema hispana samideano verkis tiun noveleton eltiritan el interesa epizodo de la hispana historio. Ĝi estas bela, bonstila

verketo kiun plezure mi legis kaj sendube tian saman plezuron ĝuos ĉiuj ĝin legantaj. Oni tamen devas bedaŭri la oftajn preserarojn en ĝi enfalintajn.

FUNDAMENTA GRAMATIKO DE ESPERANTO. Verkis: D-ro Pier Carlo Monti. Eldonis: Itala Katedro de Esperanto.—Pro sia bonega didaktika metodo, zorge kunmetita ekzercaro kaj precipe pro tio ke ĝi estas tute en esperanto verkita, tiu ĉi verko estas tre taŭga kiel lernolibro por superaj kursoj. Tamen oni devas prizorgi por estontaj eldonoj ke la oftaj preseraroj en tiu ĉi rimarkeblaj malaperu.

DAS DEUTSCHE LIED IN ESPERANTO (GERMANAJ KANTOJ ESPERANTIGITAJ). Kompilis Friedrich Pillath, eldonis Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek.—Imitindan ekzemplon prezentas la kompilinto de tiu kantaro al aliaj ĉiulandaj samideanoj. Ĉiu popolo havas siajn kantojn kaj nedubeble estas ke por la propaganda celo estus bona rimedo se la esperantistoj dum siaj kunvenoj kaj ekskursoj aŭdigus la popolkantojn en Esperanto per la sama muziko per kiu ilin oni kantas en la nacia lingvo. Rekomendinda libro kun bona Esperanto, bele prezentita kun arte desegnita kovrilo.—KATONO.

EKSTERLANDA MOVADO

S-ro Henri La Fontaine, senatano belga, dufoje gajninto de la «Nobel» premio por paco, dum parolado de li farita okaze de la Centjara Datrevena Festo de la «Societo por Paco», deklaris ke Esperanto estas la sole taŭga lingvo internacia. Tiu deklaro estis aplaŭde ricevata de la aŭskultantaro.

—La urba parlamento de Offembach enkondukis oficiale Esperanton en la urbaj lernejoj. Funkcias 12 kursoj kun 350 lernantoj. La instruistoj gvidantaj esperantajn kursojn ricevas salajron; al la lernantoj la urbo liveras senkoste la lernolibrojn.

—En Graz (Aŭstrujo) okazos la 10-14.^{an} de Aŭgusto internacia katolika kunveno al kiu anoncis ĉeeston partoprenontoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj.

—En Fürth (Bavario) 25 geinstruistoj partoprenas esperantan kurson. En tiu urbo Esperanto estas fakultative enkondukita en la progresigan lernejon.

—Esperanta Asocio de Nord-Ameriko okazigos sian 14.^{an} Jaran Kunvenon en Boston la 12-16.^{an} Julio 1921.

—En Nürnberg 80 poŝtovicistoj lernas Esperanton en 4 kursoj okazantaj en unu el la salonoj de la supera poŝtdirekcio. Ankaŭ

la fervoja direkcio de tiu sama urbo komunikis ke 92 fervojoficistoj komencos la lernadon de Esperanto la 1.^{an} de Septembro.

—La Laborista Federacio de ŝtato Ceara (Brazilujo), laŭ rezolucio akceptita la 19.^{an} de Aprilo, utiligos Esperanton en siaj internaciaj interrilatoj, kaj konsilas la lernadon de Esperanto al ĉiuj federaciaj asocioj.

—La Komerca Ĉambro de Olomouc (Ĉeĥoslovakujo) voĉdonis laŭdon al tiu de Parizo pro ĝia rezolucio favora al Esperanto kaj aliĝis al la movado.

—En la Realaj Gimnazioj de Bulgarujo la fakultativa instruado de Esperanto estas oficiale enkondukita.

—La grava Societo de Geografio de Rio de Janeiro en sia Kunsido de la 14.^a de Aprilo rezoluciis jene:

«Konsiderante ke Esperanto estas realaĵo kaj ke la kvar antaŭaj Brazilaj geografiaj kongresoj aprobis deziresprimojn de laŭdo al tiu ĉi internacia lingvo, decidis aliĝi al la 6.^a Brazila Kongreso kaj sendi tri reprezentantojn.

—En la tria Tutruslanda Kongreso Esperantista okazinta en Petrogrado la 1-5.^{an} de Junio estis akceptata la jena rezolucio:

«Atentante la nunan precipan disvastiĝon de Esperanto en proletariaj kaj laboremaj rondoj kaj la esencan utilon, kiun internacia lingvo devas kaj povas alporti por la unuigo de la laboremaj klasoj de la homaro kaj por la triumfo de la principoj de Sovjeta Regosistemo, la tria Tutruslanda Kongreso Esperantista opinias, ke fundamenta tasko de la rusa esperanta movado estas laŭpova subtenado al la Sovjeta Registaro per la lingvo Esperanto kaj helpo al ĝi en aferoj de efektivigo de ĝiaj internaciaj taskoj. Kiel plej bonan formon de la esperanta movado, la Kongreso konfesas la organizon de esperantaj filioj kaj rondetoj ĉe ĉiuj proletariaj, profesiaj kaj klerigaj organizaĵoj de la Respubliko».

Tiu kongreso partoprenita de 163 delegitoj, el 73 diversaj urboj de sovjetaj landoj, montris ke pli ol iam antaŭe estas vigla kaj intensa la movado esperantista en Ruslando, kaj la fakto ke estis eble al la delegitoj vojaĝi al Petrogrado de tre malproksimaj regionoj (ĵa kelkaj devis veturi 3000-5000 kilometrojn) evidencigas la grandan pliboniĝon de la ĝenerala situacio en la nuna Rusujo.

—Niaj samideanoj de Kioto, okaze de granda atletika festo en Ŝoken-Kan, aranĝis grandan propagandan ekspozicion, kiun vizitis 6000 personoj.

—Kun kontentiga rezultato finiĝis kvar kursoj de Esperanto aranĝitaj en komercaj lernejoj konforme al la gravega decido de la Pariza Komerca Ĉambro. En Oktobro la kursoj rekomenciĝos, espereble, eĉ kun pli da sukceso.

—En Sézannes (Francujo) 40 membroj de la Ruĝa Kruco partoprenas esperantan kurson.

—En Wood Green (Britujo) estas malfermita kurso por 50 studentoj de la Supera Komerca Lernejo.

—La Komercaj Ĉambroj de Grenoble, Calais, St. Omer, Moulin kaj Mâcon aliĝis al la decido favora al Esperanto de la Pariza Komerca Ĉambro pri kiu niaj legantoj estas jam sciigitaj.

—La ĉeĥoslovaka Ministerio de Instruado, per cirkulero dissendita al la direktoroj de ĉiuj duagradaj lernejoj, permesas kaj konsilas la instruadon de Esperanto en tiuj ŝtataj lernejoj.

—En Liège okazis kun granda sukceso dum lastepasinta Majo la Dekna Nacia Kongreso de Belgaj Esperantistoj.

—La Kongreso de Francaj Komunistoj okazinta en Parizo dum Pentekosto voĉdonis rezolucion por Esperanto.

—La 18.^{an} Aprilo en Praha okazis la unua ŝtata ekzameno de esperantaj instruistoj.

—Kun 350 enskribitoj kaj 225 ĉeestantoj okazis en Harrogate, dum Pentekosto, la Dekdua Kongreso de Britaj Esperantistoj.

—La plej maljuna esperantisto estas Pastro John Anderson. Li naskiĝis la jaron 1821.^{an}, do nun estas centjarulo; li komencis la lernadon de Esperanto je sepdekjara aĝo.



XIII^a Universala Kongreso de Esperanto en Praha

31 Julio - 6 Aŭgusto

10^a KOMUNIKO

Ĝi aperis kun la detala Programo de la Kongreso kaj lastaj sciigoj.

En la akceptejo deĵoros ŝtata letera kaj telegrafa poŝtoficejo *kun esperanta stampilo*. Ankaŭ estos monŝanĝejo, vojaĝinformejo kaj pasportsekcio.

Ĝis la 12.^a de Julio aliĝis 2197 partoprenontoj, el 39 nacioj kaj 33 ŝtatoj. Laŭ profesio la kongresanoj estas: 356 oficistoj, 201 instruistoj kaj -estroj, 189 laboristoj kaj metiistoj, 126 komercistoj, 103 studentoj, 36 profesoroj, 30 inĝenieroj, 22 advokatoj kaj juĝistoj, 19 kuracistoj, 14 redaktoroj kaj ĵurnalistoj, 12 artistoj, 10 pastroj; 155 havas diversajn profesiojn, 215 estas sen difinita profesio.

Kiam ĉi tiuj linioj aperos, la Universala Kongreso estos okazanta. Ni esperu ke ĝi forte sukcesos kaj ke niaj superaj organizaĵoj estos efike helpataj de ĝiaj laboroj.

La 21.^{an} de Julio forveturis al Praha nia estimata amiko S-ro Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», kiu reprezentos en la Kongreso la katalunlingvajn samideanojn.



ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto	Hungara Esperantisto
Le Monde Espérantiste	Esperanto Triumfonta
Esperanto-Praktiko	Nova Tempo
Itala Esperantisto	Literaturo
La Marto	Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)
La Semisto	The British Esperantist
Germana Esperantisto	Nederlanda Esperanto
Hispana Esperantisto	La Verda Ombro
Internacia Komerca Revuo	Amerika Esperantisto
Esperantista Laboristo	Libero
Kristana Espero	L'Esperanto
Verda Utopio	La Revuo Orienta
Vegetarano	El Esperanto
Espero Katolika	Brazila Esperantisto
La Esperantisto	Oficiala Gazeto Esperantista
La Laborista Esperantisto	
Esperanto	


Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921

Ĉestu nian Kongreson por pruvi la plenan revigliĝon de la Kataluna Esperantistaro!

Revivigu la antaŭajn Grupojn kaj helpu la propagandon!



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Aŭtuna Foiro 1921 de la 28^a de aŭgusto ĝis 3^a de septembro

Printempa Foiro 1922 de la 5^a ĝis 11^a de marto

La centra merkato por la internacia
komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

(Foiroŝefo por la Specimenfoiroj en Leipzig)